

PENSEO

N-ro 244

feb. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



lupo kaj virino

frosto kaj malsato sieĝas hundeton.
 batas la terglobon sed ne homon ĝi.
 ĝin adoptas virineto.
 per sia lakto ĝin ŝi nutras.
 ĝi ŝin prenas por sia patrino.
 ili estas lango kaj dentaro.
 sub la ĉielo regas naturaj instinktoj.
 monto iĝas maro en sekundo.
 la dentoj de lupo
 kreskas el ĝia buŝo matura.
 ŝi al ĝi etendas la langon;
 per siaj dentoj ĝi ŝin gratas
 por mildigi ŝian jukon.
 ĝi ŝin trompis pretervole.
 dentojn ne pro dentoj,
 ili restas filo kaj patrino.
 okuloj karesas okulojn.
 ŝia sino la lupon hundigas.
 promenante kun ĝi sur la stratoj,
 ŝi ofte al ĝi babiladas:
 homoj estas lupoj nedenaskaj.
 la planto naskiĝas senarmila;
 ankaŭ la homo kiel la besto.

vojo

inter paradizo kaj infero
 vojo distranĉas lumon en pecetojn.
 laŭ la kurbo arboj iris
 sur la pinton for de polvo.
 pli da sarmentoj kaj arbustoj
 atendas venton en la nubo ambigua.

la erekta monto estas impulso de ŝtono.
 deziroj de semoj trompis birdojn.
 la arboj neniam plu bezonas
 la kurson dancantan sur la kongestaĵo.
 nur homoj kun piedoj sen flugiloj
 ĝuas tiun vojon inter ĉio kaj nenio,
 kiun ili detruadas kaj tuj rekonstruas.
 la ombro de la birdogrupo
 fiksiĝas en la ŝvelaj sangovazoj .
 formikoj sekvas ja formikojn
 trapasante vivon kaj revivon.
 akvo tenta ĉiam estas ekscitiĝo de la homoj.



Josip Pleadin (Kroatio)



VANILODORA SONGŔO

Via haŭto odoras je vanilo,
 bonaroma frandaĵo mia!
 En via korpo fragila
 ondiĝas maro incita kaj magia.
 Du blankaj koraloj sur ĝia fundo
 en profundo sekreta kaŝitaj:
 vi kaj mi ...

Ho, vivo mistera!
 Sur mola kuseno dormante
 vi kunspiras silente kun mi ...
 Ĉiunokte mi etendas manon

kaj palpe serĉas tra mallumo.
 Kiel urtiko vundas min via foresto
 kaj restas surkusene
 nur mi, sola kaj veka ...
 Mi perdis vin!
 Ne, mi ne povas vin perdi
 ĉar mi neniam vin ja posedis,
 karulino mia:
 vin kiu vivas nur en miaj sonĝoj
 kaj odoras je vanilo,
 vin kiun mi frandas en miaj revoj.
 Vi odorigis la tutan ĉambron
 kaj mi vekiĝas pro la intensaodoro.
 Sed vi malaperas haste kiel blanka anĝelo.
 Restas nur la kuseno odoranta je vanilo.
 Ho, vivo mistera!
 Ho, sonĝo perdita!



Stanislaw Rynduch(Germanujo)



Nova jaro

Nova jaro komenciĝas
 Kaj deziroj jam naskiĝas.
 Estas ja dilem'
 Ne deziri por si mem.
 Pensu pri aliaj,
 Geamikoj viaj.

Ĉie sur la tero
 Kreskas la mizero.
 Multaj mizeruloj
 Malsataj senhejmuloj.
 Estos vi do pli feliĉa,
 Kun la helpo senkondiĉa.

Por ĉiu terano
 Devas esti pano.
 Ĉe la nova jarkomenco,

Agu kun via esenco.
 Eble estas vi viktimo,
 De la malbona kutimo?

Ĉesu trompi kaj blafemi
 Antaŭ ĉio ĉesu fumi.
 Faru ĉiun tagon
 Unu bonan agon:

Por kolego kaj najbaro,
 Pensu pri la amikaro,
 Pri bezono de malriĉa,
 Tiam estos vi feliĉa.

Januaro 2011

Rozo plej bela


Rozo plej bela floreto
 kun ĉarma bonodoreto.
 Vi floras por plibeligi,
 la grizan tagon mildigi.

Por juna kaj maljuna,
 por tago ĝoja kaj suna.
 Ĉiujn la same amante,
 dum ĉiuj tagoj florante.

Se via eĉ dorno
 estas tre pikanta,
 via bela amo
 estas tre konstanta.

Estu vi iom amata,
 por la amiko konata.
 Eĉ se li ne tute glata,
 kiu estas akurata ?

Donace al Rozo , decembre 2010




Mori (Usono)




Kiam mi rigardas

Kiam mi rigardas
 en la okulojn de
 laborulo,
 Kiam mi rigardas
 en la okulojn de
 bonulo
 Kiam mi rigardas
 en la okulojn de
 senhejmuloj
 Kiam mi rigardas
 en la okulojn de
 malsatulo;
 Mi vidas
 stelon
 falintan
 el la ĉielo.



Leieladonna (Meksikio)



Karmesino

Luno kaj suno
 arĝento kaj oro,
 lumo kaj ombro,
 varmo kaj frido
 dolĉa kaj amaro...
 la luno sin vestas skarlate
 kaj oranĝo
 kaj la suno de bronzoj,
 terakotoj, blankoj...
 la ĉielo kaj la maro
 estas skarlatataj atestantoj
 en tiu ĉi sonĝo... kun la sencoj

je floro en haŭto...
 dum la brusto
 maltrankviliĝas forte
 la sango fluas
 kaj la rezono sin perdas.
 Kun la okuloj nebuliĝantaj,
 aperas mil steloj
 kiel art-fajraĵoj
 senĉese,
 jam ne plu eblas vidi
 subite ĉion finas,
 ĉion paŝas...
 alvenas la kalmo...



Roseha (Francujo)



La Katino

Blanka-griza koloro,
 Bela felo plej densa,
 Jen estis nia katino.
 —La okuloj similis
 Al smeraldaj juveloj.
 Ĝi havis la majestan
 Teniĝon de la gento
 Felisa.
 —Scivolema, petolanta,
 Kiel floko kirliĝanta,
 Ĝi ŝatis ludi kun korko
 Kaj diversaj lanbuloj.
 —Nur, kion ĝi deziris,
 Ĝi faris.
 Antaŭ ol akcepti
 Novulon en la hejmo,
 La zorgema muzelo
 Priflaris
 —Ĝi sin kaŝis, kutime,
 Sub la diversaj mebloj.
 Tuj kiam, ĝi aŭdis
 Apetitajn buletojn

Falantaj en gamelon,
 Ĝi, rakete, eksaltis !
 —Ĝi ne havis facilan
 Personan karakteron,
 Sed, subite alvenis
 Por peti karesetojn.
 Felise, ĝi ronronis
 Kun akcentoj de Tigro
 Bengala..
 —Finfine, ĝi ekdormis,
 Brakumante la muzelon,
 La vosto volvita flanke.
 —Sed, iam ĝi foriris
 Al Paradizo de Katoj.
 Kiel oni vidas lumon
 El la mortintaj steloj
 En ĉiel'
 Ŝajnas, ke felo malpeza
 Sin enŝovas sub la meblojn.
 Kaj, silente trembrilas
 La smeraldaj juveloj....



Paŭlo Silas (Brazilo)



PRAHOMARA ORDO

Jen ĝi, sur tiu ĉi strata polvo:
 La forfluganta nigra rozo.

Kaj kri', al kiu naskiĝis buŝo:
 La elkraĉanta vorta pluvo.

Pro ni, pro nia prabesta sino,
 Jen sociala homa krimo.

Jen tri: numer'! Sanktigitaĵ Dioj
 De nenombreblaj fiaj idoj.

Ebri', prudent' el senkapa korpo,
 Duonfalanta viva morto.

Simi', kun samaj vivuloj kune:
 La sencerba homar' subsune.

Al si, al propra stomako: frapo!
 La pugnobat' al monda stato.



Historio de atomo

(Eterneco de la Materio)

Mi, atomo de roko, la granito.
 Mi, lafo de vulkan' kaj flor' serena,
 Parfum' subtila, nubo pluvoplena,
 Makul' en la pureco de l' senfino.

Mi vagis en la kosmo... Kaj mi, aerŝtono,
 Transiris mondojn de esenco vapora,
 En multaj, estis l' arteri' plej valora,
 Eĉ formis mi la koron de estaĵ' malbona.

Kun la Ter' naskiĝis mi; gas', kun ĝi, mi estis.
 Ĉeestis mi ĉe l' Komenco, kiu tempestis.
 Jen mi, nebulastro, sun', planedo nun.

Dum cent mil jarcentoj mi iĝas, enkarniĝas.
 Aglo en la altoj kaj rampanta vermo,
 Tra kosmo superfluganta fora poleno.

tradukis el la brazila portugala far

Rodolfo Teófilo



La fiŝoj de l' rivero

La virgulino sin kombas
trans la kurten' en silento,
ŝia harar' estas ora
kaj la kombil' el arĝento.

Nu jen vidu kiel trinkas
la fiŝoj de l' rivero,
Vidu kiel ili trinkas
ĉar Dio iĝis bebo.
Trinkas kaj trinkas la fiŝoj pli kaj pli,
dum Dio, sur la pajlo,
ridetas jam al ni.

La virgulino lavadas
kaj sternas ĉion sur lino,
sorĉe la birdoj kantadas
kaj kreskas lino sen fino.

Nu jen vidu kiel trinkas
la fiŝoj de l' rivero,
Vidu kiel ili trinkas
ĉar Dio iĝis bebo.
Trinkas kaj trinkas la fiŝoj pli kaj pli,
dum Dio, sur la pajlo,
ridetas jam al ni.

La virgulino preparas
la vespermanĝon plej ĝoje,
dum sur azeno revenas
Sankta Jozefo survoje.

Nu jen vidu kiel trinkas
la fiŝoj de l' rivero,
Vidu kiel ili trinkas
ĉar Dio iĝis bebo.
Trinkas kaj trinkas la fiŝoj pli kaj pli,
dum Dio, sur la pajlo,
ridetas jam al ni.


*Originala titolo: Los peces en el río
(Villancico)*

Aŭtoro: Nekonata.

Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)



Manuel Bandeira*



La bufoj

Eliras ŝvelkrope,
El la duon-ombro,
Por lumo, hophope,
Da bufoj sennombro.

Per ronko terura
Blekas Bovo-buf':
"Belsaltas ul' krura!"
"Huful' ne" "Ve huf'!"

Bufo Martelema,
Parnasa bigoto,
Diras: "Per bat' trema
Ne 'stos vers-ekzoto.

Vidu, fajne, vere,
Mi glutas hiatojn!
Art' ja! Kaj, rimsfere,
Rifuzas rilatojn.

Konsonantpied'
Tritikas, ne lolas.
Tia rimrimed'
Ĉe mi altrolas.

Dum kvindek jaroj
Regis normo, regu:
Sen fuŝ' al reglaroj
Etforno grandegu.”

Pluu bufar-krio
Kun plendoj skeptikaj:
Jen, sen poezio,
Artoj poetikaj...

Blek' el Bovo-buf':
“Saltu ul' kun huf'!”
“Povas ne!” “Ve huf'!”

Bufo Martelema
Hastvočas, persista:
“Fajnart' estas gema
Labor' juvelista.

Aŭ havaĵ' statuta.
Ĉio ajn kun belo,
Ali-atributa,
Pasu sub martelo”.

Barel-bufoj geste
(Kun kia bonsido...)
Ronkas elinteste:
“Vi!” “Do vi!” “Do!” “Vido!”

For de ĉi kriado,
Sub kia obskuro
De ĉiel-arkado
Nokta, sur plankduro

Fia de abismo,
Sen gloro, kaj en
Via simemismo,
Senkonsole jen

Ĝemas vi, batrak',
En frida mizero,
Sen ŝuoj, sen frak',
Kaj for de rivero...

poezio brazila. Lia temata poemo, en la originala "Os Sapos" estis legita dum evento kiu iĝis marko en artoj kaj literaturo de la lando nome Modernarta Semajno, kaj kiu okazis en jaro 1922, en urbo San-Paŭlo. Li mem ne ĉeestis ĝin. Legon faris alia poeto, kaj dume estis tumulto ĉar kelkaj figuroj el parnasa skolo ĉeestis (iuj foriris de la salono...) Parnasa skolo estis precipe elita. La poemon li ĝuste en perfekta kvinsilaba formato kreis, kio kremis kadre de parnasa stilo. Li ĉesis vivi inter ni en jaro 1968.

Tradukis



Úel (Brazilo)



JUHÁSZ GYULA* (1883 - 1937)

ĈU AMO?

Ne scias mi kial, sed plezure
Ja estas vin revu rave, pure,
Ornubon krepuskan sur ĉielo
Trans kiu heletas pala stelo.

Ne scias mi kial, dolĉamaraj,
Albrilas okuloj viaj karaj,
Lastlasta radio al la tero
Jam antaŭ ol mornas la vespero.

Ne scias mi kiel, sed mi sentas,
Ke belas la vivo, ree sencas.
Karesas la koron vorto varta,
Kiel la tombejon vento marta.
Ne scias mi kial, sed plezure
Dolĉa dolor' doloras velure.
Vanaĵe eĉ, ĝi min ĉirkaŭvolvu,
Se amo ĝi, do vi min absolvu!

* Manuel Bandeira estis granda stelo de moderna

JAPANESKE

Neniam havis mi konstru-inklinon,
Neniam logis min trezoro vanta,
Deziroj miaj loĝas la senfinon,
Kaj mia estas vi, printempo sankta.

*

En iuj noktoj luno, ortelero,
Proksimas tiel sur ĉiellazuro,
Kaj tiel malproksimas la sufero -
Ĝi flugis eble al ĉiela ĝuo.
En olda vino tiom da memoroj
Kaj tiom da forgeso vivas, ke jam ŝajnas
Al mi, kun paca ĝojo, ke l' doloroj
De mia viv' pasinta en ĝi fajnas.

*


Alsendis mia amatin' la keston, -
La nokte nigra, nigra kest' tuĉita -
En ĝi jazmenon velkan, la ateston
De mia velka vivo jam fuŝita.

*

Ĉasistoj povraj iun cervon ĉasis,
Pelitaj same de la vivospronoj.
La cervokuloj sangogutojn larmis,
Sed ĝi feliĉas pli jam, ol la homoj!

**hungara poeto*

Esperantigis



Jozefo E. Nagy
(Rumanujo)



Muzik'

(France Gall)

Fuĝu ni en malhejmeca l'mond'
For de l'ŝovelmaŝinoj bru'
Konstruantaj, ĉu ?
Mutiĝu la melankoli'

Per la nia propra ritm', kaj nia ĝu'.

Muzik'!

Ja ni ĉiuj de nun ekkantu,
Lasu nin ĉiu de ĝi kunporti,
Ĉiu al l'alian premiĝu,
Ĉiu la alian brakumu
Palpe apude.

Muzik' !

Orkestroj ĉie nun ekludu,
Memoroj ĉe ĉiu ekrevu,
Ni lasu nian pensadon krozi,
Lasu ke nia korp' miriĝu
Palpe apude.

Muzik'!

Ni 'stas tro feblaj por mortigi,
Ni 'stas tro solaj por malami,
Tro da sufer' por da aldoni,
Tro da nenio por interŝiri
Unu alian.

Muzik'!


Demetu l'spadojn ĉe l'piedoj
Resendu armeojn al hejmoj
Ĵetu teren ŝildojn, prefere
Klaku fingroj kaj frapu l'piedoj.
Ek! Du, tri, kvar !

Muzik'

Milda, milda, milda, milda, milda muzik'
Hmm!
Milda, milda, milda, milda, milda muzik'
Hmm.....



Elfrancigis
Roland Platteau (Francujo)



Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Spektado al neĝa pejzaĝo

—laŭ ĉineska skemo Wanghaichao*

blankaj flokoj
dance flirtas
el nebula ĉiel'
en ventblovo
sub svaga sun'
kun tre rigora gel'
sterniĝas sur ter'
la tuk' arĝenta
brile en hel'
jen ebena
kaj bonorda sen ribel'

la montoj en mantel'
en opal-kolor'
kaj kun ĉapel'
pure palas
travideblas
arboj jen per ombrel'
kun glacia bel'
staras senparola
kaj sen ŝancel'
kia pejzaĝ'
de neĝ-glacia fabel'



*Wanghaichao (rigardo al martajdo): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 446, 446, 5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

Guozhu (Ĉinujo)



Danco Lojala

—laŭ ĉinesko Yujia'ao*

Danco sub nom' Lojala
rito oficiala
en tempo anormala,
batala,
fanatike morala.

Mov' laŭ takto cimbala,
paŝ' laŭ ritmo timbala,
en etoso fatala.
Skandala
rekordo speciala.

2012-01-06



* Yujia'ao (Fiŝista fiero): ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,7,7,3,7, silaboj, kun kontinua rimo.

Printempa trafiko

—laŭ ĉinesko Xiaomeihua*

Sufere./ mizere./ atendadi ekstere./
kruele./ sardele./ tranokti ofte subĉiele./
kun revo por aĉeto / de vagona bileto/
revena/ matena/ post interpuŝiĝo homplena. /
Problemo/ kun ĝemo/ fariĝas fokus-temo/
primare/ amare/ sensolva preskaŭ ĉiujare./
Promes' oficiala/ sonas mensog' skandala./
Kunsenta/ lamenta/ ploras mia kor'
sentimenta.

2012-01-13



* Xiaomeihua (eta umefloro): ĉina fikforma poemo eldu strofoj po 11 versoj de 3,3,7; 3,3,9; 7,7;3,3,9 silaboj, laŭ rimaranĝo aaa bbb cc ddd.

Fotoj pri la Printempa Trafiko

—laŭ ĉinesko Siyuanren*
Jen fotoj pri printempa
trafiko scena.
Pasaĝeroj
diverslokaj
en trajn' homplena.

Kun celo hejmrevena
tra vojaĝ' ĝena.
Legiĝas laco.
Nin kortuŝas
veo miena.

2012-01-29



* Siyuanren (Sopiro pri Fora Homo): ĉina fikforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima).

Novjara Bildkarto

—laŭ ĉinesko Niannujiao*
Scivoleme/ atendas/ mi en fru-mateno
kun konjekto:/ De kie/ okazos alveno
de l' unua/ ret-poŝtaĵo/ kun nova beno?

El Usono/ venas al mi jeno:

Bildkarto de Cindy, /nin ridiga per
/humur-pleno:
Hundo sidas/ ĉe osto/ kvazaŭ ĉe festeno.
mi rapide/ elfaras tekston/ kun refreno
kaj ĉineskas/ laŭ mia kompreno.



*Niannujiao (ĉarma kantistino): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Viktoro (Ĉinujo)

Nokta pluvo

—laŭ ĉineska skemo Litingyan*
Pluvgutoj tiktakas
tra la nokto tuta.
Homoj dormas profunde
en muziko guta.
Mi sidas sola
kaj aŭskultas muta.

Jam en florigardeno
venas ŝanĝ' akuta.
Petaloj falas teren
pro pluvo disŝuta.
Folioj verdas
pli kun poz' saluta.

*Litingyan (hirundo ĉe kiosko): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 66, 76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)



Nova neĝo

—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo*

neĝ'
kovras arbojn sur monteĝ'
blankbrile
kiel nobla reĝ'

el
la ĉielo la mantel'
ĵetiĝis
jen kun flirta bel'

per
blanka donac' al la ter'
ornamas
la neĝa leĝer'



**Dekses-Silabo*: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa (x=senrima)

Maupassant (1850-1893)



LA PATRO

Johano de Valnŭa estas amiko, kiun mi vizitas de tempo al tempo. Li loĝas en malgranda nobeldomo, ĉe riverbordo, meze de arbareto. Li izoliĝis tie, post vivinte en Parizo, vivon de frenezulo, dum dek kvin jaroj. Subite, li tediĝis de la plezuroj, la vespermanĝoj, la viroj, la virinoj, la ludkartoj, ĉio, kaj li venis loĝi en tiu bieno, kie li naskiĝis.

Ni estas du aŭ tri amikoj, kiuj travivas, de tempo al tempo, du aŭ tri semajnojn kun li. Certe ja, li estas ravegita revidi nin kiam ni alvenas, kaj kontentega sin retrovi sola kiam ni foriras.

Do, la pasintan semajnon, mi iris en lian hejmon, kaj li akceptis min plenbrake. Ni pasigis la horojn, jen kune, jen izole. Ĝenerale, li legis, kaj mi laboris dum la tago, kaj ĉiuvespere ni interbabiladis ĝis noktomezo.

Do, lastan mardon, post sufoka tago, ni sidiĝis ambaŭ, ĉirkaŭ la naŭa vespere, rigardante flui la akvon de la rivereto kontraŭ niaj piedoj, kaj ni interŝanĝis tre svagajn ideojn pri la steloj, kiuj sin banis en la fluo, kaj ŝajnis naĝi antaŭ ni. Ni interŝanĝis tre svagajn, tre konfuzajn, tre mallongajn ideojn, ĉar niaj mensoj estas tre limigitaj, tre feblaj, tre senpotencaj. Persone mi kormoliĝis pri la suno, kiu mortiĝas en la Granda Ursino. Ni plu vidas tion nur la helaj noktoj, tiom ĝi paliĝis. Kiam la ĉielo estas iom bruma, tiu agonianto malaperis. Ni pensis pri la estaĵoj, kiuj populumas tiujn mondojn, pri iliaj neimageblaj formoj, iliaj nesuspekteleblaj kapabloj, iliaj nekonataj organoj, pri la animaloj, la plantoj, ĉiuj specioj, ĉiuj regnoj, ĉiuj esencoj, ĉiuj materialoj, kiujn la homa revo ne povas eĉ tuŝeti.

Subite, voĉo kriis malproksime:

– Sinjoro, sinjoro!

Johano respondis:

– Ĉi tie, Baptisto.

Kaj kiam la domservisto trovis nin, li anoncis:

– Estas la ciganino de Sinjoro.

Mia amiko rideksplodis, tiu kiu estis tre malofta koncerne lin, poste li demandis:

– Do hodiaŭ estas la 19an de julio, ĉu?

– Sed jes, Sinjoro.

– Bonege. Iru diri al ŝi, ke ŝi atendu min. Vespermanĝigu ŝin. Mi revenos post dek minutoj.

Kiam la servisto malaperis, mia amiko

ekprenis al mi la brakon, kaj diris:

– Ni iru promeni malrapide, mi tuj rakontos al vi tiun historion.

Antaŭ nun sep jaroj, dum la jaro kiam mi alvenis tie ĉi, iun vesperon mi eliris promenadi en la arbaron. La vetero belis kiel hodiaŭ, kaj mi malgrandpaŝe marŝis sub la grandaj arboj, kontemplantе la stelojn tra la folioj, spirante kaj trinkante plenpulme la freŝan ripozon de la nokto kaj la arbareto.

Mi ĵus forlasis Parizon por ĉiam. Mi estis laca, laca, naŭzita pli ol mi sciis diri pro ĉiuj stultaĵoj, ĉiuj malnoblecoj, ĉiuj fiagoj, kiujn mi vidis, kaj al kiuj mi partoprenis dum dek kvin jaroj.

Mi iris malproksime, tre malproksime, en tiun profundan arbareton, sekvante kavan vojon, kiu kondukas al la vilaĝo de Crouzille [Kruzil], je dek kvin kilometroj de ĉi tie.

Subite Bok, mia hundo, granda San-Germana hundo, kiu neniam forlasis min, haltis kaj ekgrumblis. Mi kredis je la ĉeesto de vulpo, lupo aŭ apro, kaj mi antaŭeniris malrapide, sur la pintoj de la piedoj, por ne brui, sed abrupte mi aŭdis kriojn, plendajn, obtuzajn, korŝirajn, homajn kriojn.

Certe ja, oni murdis iun en arbeto densejo, kaj mi ekkuris, premante en mia dekstra mano pezan marŝbastonon el kverko, veran klabon. Mi proksimiĝis al la ĝemadoj, kiuj nun fariĝis pli distingeblaj, sed strange obtuzaj. Oni estus kredinta, ke ili eligus el domo, eble el kabano de karbonisto. Bok, je tri paŝoj antaŭ mi, kuris, haltis, reiris, tre ekscitata, ĉiam grumblante. Subite alia hundo, dika nigra hundo, kun fajraj okuloj, baris al ni la vojon. Mi tre bone vidis ĝiajn blankajn dentegojn, kiuj ŝajnis flagreti en ĝia faŭko.

Mi kuris al ĝi, levante mian marŝbastonon, sed jam Bok saltis sur ĝi, kaj la du bestoj sin disrulis surtere, kun la faŭkoj fermitaj sur la gorĝoj. Mi preterpasis, kaj preskaŭ puŝis ĉevalon, kiu estis kuŝanta sur la vojo. Dum, tre surprizita, mi haltis por ekzameni la beston,

mi ekvidis antaŭ mi veturilon, aŭ pli ĝuste ruldomon, unu el tiuj domoj de ĉarlatanoj kaj bazaristoj, kiuj vojiras tra niaj kamparoj, de foiro al foiro.

La krioj eligis el tiu rulhejmo, forlogaj, kontinuaj. Ĉar la pordo rigardis al la alia ekstremo, mi ĉirkaŭiris tiun veturilaĉon, kaj abrupte grimpis la tri lignajn ŝtupojn, preta sturmi la krimulon.

Kion mi vidis ŝajnis al mi tiom stranga, ke unue mi nenion komprenis. Viro, surgenuе, ŝajnis preĝi, dum en la lito, kiun enhavis tiu rulujaĉo, neidentigebla io, duonnuda estaĵo, kurbiĝanta, distordita, kies mi ne vidis la vizaĝon, moviĝadis, turniĝadis kaj hurladis.

Estis akuŝanta virino.

Tuj post kiam mi komprenis la specon de akcidento, kiu okazigis tiujn plendojn, mi konigis mian ĉeeston; tiam la viro, ia frenezigata Marsejano, petegis min, ke mi savu lin, ke mi savu ŝin, promesante al mi, per nenombreblaj paroloj, nekredoblan dankemon. Mi neniam vidis akuŝon, neniam helpis al ina estaĵo, virino, hundino aŭ katino, en tia cirkonstanco, kaj mi naive deklaris tion, dum kun konsterno mi rigardis tiun, kiu tiom laŭtege kriis en la lito.

Poste, kiam mi retrovis mian memregon, mi demandis al la konsterna viro, kial li ne iris ĝis la proksima vilaĝo. Sed lia ĉevalo, kiu estis falinta en vojsulko, devis rompi al si la gambon, kaj ne plu povis stariĝi.

– Nu! mia bravulo, mi diris al li, nun ni estas du, ni tuj trenos vian edzinon ĝis mia hejmo.

Sed la blekadoj de la hundoj, devigis nin eliri, kaj estis necese disigi ilin per bastonbatoj, riskante mortigi ilin. Poste, mi havis la ideon jungi ilin kun ni, unu dekstre, la alia maldekstre, en niaj gamboj, por ke ili helpu al ni. Post dek minutoj la jungilaro estis preta, kaj la veturilo malrapide ekvoĵiris, skuante sur la veturskuoj de la profundaj vojsulkoj la kompatindan virinon, kun la utero ŝirita.

Kia vojirado, mia kara! Ni iris anhelante, stertorante, ŝvitante, glitante kaj iafoje falante, dum niaj kompatindaj hundoj, en niaj gamboj, blovis kiel mil diabloj.

Tri horoj estis necesaj, por ke ni atingu la kastelon. Kiam ni alvenis antaŭ la pordo, en la veturilo la krioj ĵus ĉesiĝis. La patrino kaj la infano bone fartis.

Oni kuŝigis ilin en bonan liton, poste mi jungigis mian kabrioletan, por ke oni iru serĉi kuraciston, dum la Marsejlano, trankviliĝanta, konsoliĝanta, triumfanta, manĝis ĝis sufokiĝi, kaj ebriiĝis ĝis mortiĝi, por festi tiun feliĉan naskiĝon.

Estis knabino.

La paro kaj la infano restadis dum unu semajno hejme. La patrino, F-ilo Elmira, estis aŭguristino, kiu promesis al mi longdaŭran vivon, kaj nenombreblajn feliĉegojn.

Post unu jaro, je la sama tago, ĉirkaŭ eknoktiĝo, la domservisto, kiu post momento alvokis min, iris al mi en la fumsaloon post la vespermanĝo, kaj diris al mi: "Estas la ciganino de la pasinta jaro, kiu venas danki Sinjoron."

Mi ordonis, ke oni enirigu ŝin, kaj mi restis konsternata, ekvidante apud ŝi grandan knabon, dikan kaj blondan, Nordan viron, kiu salutinte min, ekparolis, kiel ĉefo de la komunumo. Li eksciis mian bonaĵon rilate al F-ino Elmira, kaj li ne volis preterlasi tiun datrevenon, ne venante persone danki min, kaj esprimi la dankemon de lia komunumo.

Mi regalis ilin per vespermanĝo en la kuirejo, kaj gastigis ilin por la nokto. La postan tagon ili foriris.

Nu, la kompatinda virino revenis ĉiujare, je la sama dato, kun la infano, belega knabino, kaj ĉiufoje... nova sinjoro. Nur unufoje, Aŭvernĵano, kiu bone "danĥis" al mi, reaperis du sinsekvajn jarojn. La malgranda knabino nomas ĉiujn paĉjo, kiel ni diras "sinjoro" en nia medio.

Ni alvenis al la kastelo, kaj ni konfuzo

ekvidis; starantajn antaŭ la perono tri ombroj, kiuj atendis nin.

La plej alta antaŭeniris kvar paŝoj, kaj kun granda saluto:

– Sinjoro grafo, ni venas tiun tagon, scias vi, manifesti al vi nian dankemon...

Li estis Belgo!

Poste, la plej malgranda parolis, per tiu afekta kaj nenatura voĉo de la infanoj, kiam ili recitas ĝentilaĵon.

Ludante la naivulojn, mi aparte parolis kun S-ino Elmira, kaj post kelkaj diraĵoj, mi demandis al ŝi:

– Li estas la patro de la infano, ĉu?

– Ho! ne Sinjoro.

– La patro, li estas mortinta.

– Ho! ne, Sinjoro. Iafoje, ni ankoraŭ vidas nin reciproke. Li estas ĝendarmo

– Ha! Pa! Tiam ne estas la Marsejlano, la unua, tiu kiu ĉeestis al la akuŝo!

– Ho! ne, Sinjoro. Tiu ĉi estis malhonestulo, kiu ŝtelis ĉiujn miajn ŝparaĵojn.

– Kaj la ĝendarmo, la vera patro, ĉu li konis sian infanon?

– Ho! jes, Sinjoro, kaj eĉ li bone amas ŝin; sed li ne povas zorgi pri ŝi, ĉar li havas aliajn infanojn, kun lia edzino.

Je la 26a de julio 1887.



Elfrancigis

Noël Lecomte
(Franujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

